

23-a Jaro N-ro 247-248 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo.


Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

La centjara jubileo por la granda hinda poeto kaj filozofa

Rabindranath Tagore (1861-1941)

En majo de tiu ĉi jaro okazos en Hindujo kaj tra la mondo kulturmanifestacio pro la centjara datreveno de la naskiĝo de la granda poeto kaj filozofa Rabindranath Tagore. En Hindujo oni starigis antaŭ 3 jaroj la Jubilean Komitaton, kun s-ro Nehru, la ĉefministro de Hindujo, kiel la prezidanto, kaj

preparas diversajn programojn por memorigi kaj honorigi la noblan spiriton de la grandulo. Nuntempe, kiam diversaj ideologioj kaj potencoj konfliktas unu kun la alia, estas treege necese, ke homoj ĉerpu novan inspiron el la alta idearo de ↗



→ Tagore, kiu nemal multe nutris la ideologion de la "tria potenco" paciga inter la tendaroj de la du grandaj mondpotencoj.

Rabindranath naskiĝis en Kalcutta (Bengal) la 6-an de majo 1861, kiel la plej juna el 7 filoj de Debendranath Tagore (1817-1905). Li estis edukita en la tradicia kaj kulture fekunda klimato de Bengal kaj samtempe ricevis gravan influon de sia progresema patro. Jam en knabeco li montris genion de poeto kaj pensulo. Sed lia intelekta maturiĝo okazis precipe post kiam, en 1877, li unuafoje vojaĝis al Anglujo, kie li kontaktiĝis rekte kun okcidenta civilizo. Poste li havis okazon fari mondvojaĝon kaj vizitis ankaŭ Japanujon kelkfoje. En 1913 li la unua en Azio ricevis la Literaturan Premion de Nobel.

Tagore sentime kaj brave kritikis la orientan kaj okcidentan kulturojn kaj juĝis ilin tute objektivane. Li ne apartenis al tiuj simpluloj, kiuj kategorie kondamnis la okcidentan civilizon kiel materialisman kaj laŭdegis la orientan kulturon kiel spiritualisman. Li forte estimis la

“spiriton” de l’ okcidenta scienco, kaj taman li ne forgesis juĝi, ke materialismo, sciencismo kaj maŝinismo venenas la modernan kulturon.

Li estis denaska poeto kaj verkis multajn poemojn. Sed li estis ankaŭ granda pensulo, kiu pruvis la falsecon de la tiam ĝenerale akceptita ideo, ke l’ Okcidento falos post la leviĝo de l’ Oriento. Li asertis, ke la antaŭdiraĵo de la germana verkisto Spengler ne estas ĝusta: la leviĝo de Azio, kontraŭe, helpas al Okcidento eliri el la dilemo, en kiun ĝi falis pro la egoisma materialismo kaj la rabekspluatismo aplikataj kontraŭ la popolamasoj de Azio. La liberiĝo de Azio for de la jugo de Okcidenta imperialismo estos samtempe la liberiĝo de okcidentanoj for de la malbonoj, kiujn ili plenumis per koloniisma politiko. Ĉu la hodiaŭa mondo ne pravigas lian akran klarvidon? Ni ĉiuj salutu en Tagore unu grandan viziulon, kiu el la tiama Oriento sciis sin levi al la horizonto de universala mondkoncepto.

La ideoj de Tagore ampleksas diversajn kampojn: religio, filozofio, pedagogio, sociologio, poezio kaj arto. Estas senbezone diri, ke ili donis grandan influon al multaj hindaj inteligentuloj, kaj la Bengala literaturo, por kiu li ludis eminentan rolon, fariĝis la kerno de la moderna literaturo de Hindujo, konsistanta el diversaj idiomoj. La Visva-Bharati-Universitato en Santiniketan estas fondaĵo de Tagore. En tiu universitato oni ankoraŭ daŭre praktikas la karakterizan edukadon post la fondinto en la fakultatoj literatura, filozofia, arta, ktp. Multaj hindaj gejunuloj ĉiujare enmatrikuliĝas por sekvi la idealon kaj spiriton de Tagore.

Ni opinias, ke la plej granda omaĝo, kiun ni esperantistoj povas fari al Tagore okaze de ties datreveno, estas la ĵuro kaj klopodoj disvastigi nian lingvon en Azio, precipe en Hindujo. Ni esperas, ke niaj okcidentaj gesamideanoj kunlaboros por tio, kaj petas al hindaj kaj aliaj aziaj gesamideanoj, ke ili komuniku al ni sian adreson por nia estonta solidara kunlaboro!

*

Por memorigi la centjaran celebron, la supre menciita Jubilea Komitato planas konstrui Rabindra-Muzeon en Santiniketan, kaj por riĉigi la enhavon de ties biblioteko, nia hinda samideano kaj sekretario de la nomita universitato, s-ro Lakshniswar Sinha (Vinaya-Bhavana, Santiniketan, West Bengal, Hindujo) deziras, kun la helpo de l’ esp-istoj tra la mondo, kolekti jenajn memoraĵojn: tradukaĵoj de verkoj de Tagore, verkoj pri Tagore, fotoj kaj pentraĵoj de Tagore faritaj de artistoj. Jen estas bonega okazo por ke ni per kontribuo de la dezirata materialo montru al la gvidantoj kaj kleruloj de Hindujo la gravecon kaj praktikan utilecon de Esperanto; kaj tiel ni plej bone partoprenos la jubileon.

La Red.

Notoj pri Dikredo

de Hidemaru Deguĉi

Neniu homo estas pli mizera en la mondo ol tiu, kiu ne havas lokon, personon aŭ ion, kiu ebligas al li ĝui vere trankvilan kaj pacan ripozon. Aparte homo estas unu kosmo aŭ "mondo". Havi nuu kunhomon en la vera senco de la vorto signifas, ke oni posedas unu "mondon" por eterna vivo.

*

Ĉiu ajn objekto materia povas enteni kaj porti nian koron. Ni traktu ĉiujn objektojn per nia pura, ama kaj bonamisma koro.

*

Kiuj senkritike akceptas la novmodojn unu post la alia kaj pri tio fieras, tiuj estas barbaroj.

*

Estas plej necese, ke ni introspektu por rimarki niajn malbonajn flankojn kaj klopodu korekti ilin. Sen nia propra reformo okazas nenia reformiĝo ĉe l' aliaj kaj la medio en kiu ni vivas. Cetere, sen nia reformiĝo, nia propra sorto mem restos por ĉiam la sama tra eĉ sennombraj reenkarniĝoj.

*

Ĉiuj aferoj, kiuj okazas al ni kaj ĉirkaŭas nin en la medio, estas finfine la fenomenoj altiritaj de ni mem laŭ la leĝo de *interrespondeco* de nia spirito kaj medio (spirito kaj materio). Sed ni ne forgesu, ke feliĉo aŭ malfeliĉo en la monduma senco ne ĉiam estas la samaj kun tiuj en la vera senco.

*

Dikredo estas vivo. Laŭ la mezuro, kiel nia kredo progresas, nia vivo devas fariĝi pli kaj pli bona ne nur interne, sed ankaŭ ekstere. Alie, io

eraras en nia kredo.

*

Se nia dikredo ĉiam restas vaganta tien kaj reen sur la ŝtupo de sama ebena, ĝi estas taŭga por nenio. Ĝi devas supreniri sur pli kaj pli altajn ŝtupojn. Por tio necesas, ke ni faru ĉiam novan decidiĝon por strebado alten.

*

Por tiel diri, la fizika mondo kuŝas sur horizontala ebena kaj la spirita mondo staras vertikale. El multaj diversaj regnoj de la spirita mondo venas la konstantaj ondoj de plej variaj lumoj, koloroj, sonoj, vibroj direkte al ĉiu individua homo sur la tero. Ni estas la enkarniĝintoj, kiuj dancas pro ili marionete. Ni klopodu — ne, ni preĝu al Dio, por ke ni povu vivi ricevante nur la bonajn ondojn kaj forrezisti la alfluan de malbonaj ondoj.

*

Kvar Stupoj de Dikredo.

1. Periodo de purigado. Ĝi estas la periodo de “pagado de la ŝuldoj” de nia spirito; la periodo de suferoj kaj kvazaŭ-perdoj. Nur havadu la fortan paciencon kaj eltenu ĝin per firma dikredo.

2. Periodo de hardado. Spirita kaj fizika. La periodo de ankoraŭ multaj suferoj; sed ni jam povas havi esperon. Travivu ĝin kiel eble plej rapide per dikredo, instrospekto kaj ŝtala volo.

3. Periodo de kulturado. Dum tiu ĉi periodo ni povas fariĝi jam iomete pozitivaj kaj orienti nin al ĝusta direkto de nia vojo. Ni ekhavas iom da memfido kaj nia koro spontane impetas antaŭen kaj alten.

4. Periodo de servado. La periodo de nia servado al Dio kaj kunhomoj. Jam la Lumo estas trovita. Sed necesas konstanta strebado al la unueco de Kredo kaj Ago por ke ni praktiku la servadon ĉiam plivaste kaj pliprofunde.

Trad. T. N.

Havu Fidon!

1. Se trafas vin malfeliĉo, aŭ vi estas malkontenta kun via sorto, ne grumblu, ĉar despli malbone fariĝos. La suno brilas ankaŭ por vi.

La vivo ne estas sensenca kiel vi ofte pensas, neante pro tio la ekziston de ĉio dieca, ĉar despli malboniĝos ja ĉio.

Kredu, se vi ne imagus vin tia, kia vi vin nun sentus, vi ne malsanus, vi ne malfeliĉus, vi ne ĉagreniĝus, vi ne afliktiĝus, vi ne sentus vin malfeliĉa.

Forigu la malbonajn pensojn el via falsa imago, serĉu solecan lokon, kaj silentu aŭskultante: El via interno venos respondo frustrante, "Havu Fidon!"

2. Vi ne naskiĝis por suferi, kaj via Kreinto ankaŭ ne volas vian malfeliĉon. Li estas tiel neŭtrala kiel la suno, kiu brilas por ĉiuj.

Tial fidu al la bono! Por ke la bono venku la malbonon! Alie la malbono kreskas kaj sufokas la bonon en vi.

Viaj ĉiujspecaj suferoj, zorgoj kaj malĝojoj akompanos vian vivon sopirante al la perdita paradizo: "Estu bona kaj Havu Fidon!"

3. La bono ĉiam venkos. Se via najbaro estas la kaŭzo de via sufero, ĉar li malbonas vin, restu bona kaj ne ĉagreniĝu!

Pardonu al li, kaj ne rebatu per malbonaĵoj, kaj via najbaro ĉesos esti malbona kontraŭ vi.

La bono en vi privenkos la malbonon en li. Sed per ĉiu rebato trafos vin duobla reago, kaj vi rikoltos kion vi semis: Ĉagrenon! Malamon! Tial: "Estu bona, kaj Havu Fidon!"

4. Kio estas bona, estas ankaŭ bela. Kiel malbela estas ofte la ago de homo malbona, signita per malbela vidaĵo! Ĉu vi ne scias, ke ankaŭ la malboneco materialiĝas same kiel la boneco?

La boneco elradias kaj beligas vin. Ĉu la beleco en la naturo ne ankaŭ atestas la bonecon kaj la perfektecon de ĝia Kreinto?

Kial dubi? Dubo maltrankviligas. Malbonaj agoj ne atestas pri homaj perfektecoj. Nobligu vian koron! Kaj: "Havu Fidon!"

5. Vi ankoraŭ ne konscias pri via destino. Ĉu vi povas nomi beston moralista estaĵo?

Vidu, la besto estas ligita al sia instinkto. Al kio vi estas ligita? Per la moralo vi estas ligita al via Kreinto, por esti Lia kunlaboranto. Li estas via helpanto, eĉ se vi Lin neas.

Li ĉiam estas estanta : la Nevideblulo kaj Verulo. En viaj emoj : esplori, scivoli, pripensi, serĉi kaj mediti, vi alproksimiĝas al Li, kiu estas la Vero. La vero liberigos vin, alie vi restos sklavo de viaj malperfektaĵoj. Tial serĉu, kaj : “Havu Fidon!”

6. Vi ne vivas sole por manĝi kaj trinki, sed vi konservas vian vivon per tio por vivi. Vivo estas konscio! Servu per via vivo por via Kreinto, kiun vi ekkonos en via proksimulo, kaj amu lin.

La Kreinto estas via konservejo. Vi ricevos abunde, laŭ via bezono. Sanktigu la ricevitaĵon per malavareco kaj boneco, kaj ĉio refluos abunde. Tial celu al la bono, vero kaj belo. Ĝi estas la ĉielregno en vi. Kaj : “Havu Fidon!”

7. Kies konscio estas plena de bono kaj belo, tiu ne povas esti ne justa. Kial vi plendas pri maljusto, se via faro mem estas maljusta?

Ĉia maljusta faro reagas per venĝo duoble maljusta. Maljustaĵoj estas disharmonioj kaŭzitaj de la neobeo al la morala leĝo.

Ne miru pri viaj afliktoj, kiuj atestas vian disharmonion, kaj malplenen en via interno.

Plenigu vian vivon per amo! Ne pensu: mi suferas! Ne pensu: ili min trompos! Ne dubu! Sed: “Havu Fidon!”

8. Kia amo? Tio ne gravas. Ĉia amo estas plena je bono, vero kaj belo. Amu laŭpove, kiun vi povas ami. Ĉion, kion vi povas ami, sed amu ĉiam. Ne okupiĝu pri la celo de via amo. Ĝi en si mem enhavas sian celon: “fariĝi unu kun Dio.” Tial ne timu, sed: “Havu fidon!”

9. Al kiu ni fidu? Fidu al la ne videbla Kreinto, kiu loĝas en vi. Jam de eterneco al eterneco Li estis, estas kaj estos ĉiam sub la sama nomo: “Mi estas, kiu estas!” Tiel Li prezentis sin jam al ĉiuj, kiuj Lin viziis en ĉiuj partoj de la mondo, kaj faroj estas admirataj de ĉiuj popoloj, sed nur diversmaniere laŭ la grado de ilia evoluo. Tial ne timu, sed: “Havu fidon!”

10. La vero liberigas vin, kaj malaperos superstiĉo kaj nescio. Ĉu vi ne spertis kiel vi pendolas ĉiam inter la du grandaj inklinoj, kiuj estas: avideco kaj malavareco?

La avideco estas parto el la besta naturo. La malavareco estas parto el la dia naturo. La gvidilo de la besto estas ĝia instinkto. La gvidilo de la homo estas ĝia konscienco.

Tiel estiĝas en via interno la granda batalo inter la du regnoj. La bono en vi devas utili por kontraŭbatali la malbonon en vi. En ĉi tiu batalo kuŝas la senco de la vivo: “elveni el la malperfektaĵoj de la pasinteco, por enveni en la perfektecon de la estonteco.

Jen manifestiĝas la procedo de la progreso destine kaj plane, favore

al luma estonto, en kiu vi partoprenas per: "Perfektigu kaj fidu!"

11. Analizu vian penson el kio ĝi konsistas? Senforma, nevidebla, nemezurebla kaj neimagebla, ĝi estas la plej granda potenco kiun la homaro spertis, spertas kaj spertos. Nome: La penso estas la origino de ĉio kaj ĉiuj, ja eĉ, de ĉiaj homaj inventoj kaj ties uzado por bono aŭ malbono. Tial la penso estas ankaŭ la origino de via sorto, kia ĝi estas kaj kio ĝi estas. Per la penso ni havas signon pri la spirito kiu estas Dio! Se vi havas komprenkapablon: "Komprenu kaj havu fidon!"

12. El iu fonto venas la pensoj: lumaj aŭ mallumaj, bonaj aŭ malbonaj. Tial provu vian koro: kia ĝi estas, tia estas via menso, luma aŭ malluma, kontenta aŭ malkontenta, kaj via korpo, sana aŭ malsana. Eĉ viaj prospero kaj bonfarto dependas de via menso: ĉu vi sukcesas aŭ malsukcesas? Al kio celas via koro, al tio celas via menso. Havu: "Fidon!"

13. La regno de Dio estas en vi. La pordo al Dio estas via menso. En via interno serĉu la solvon de ĉiuj problemoj, eĉ se vi kredas ilin nesolveblaj.

Demandu al la kaŝita arkitekto, kiun Jesuo nomis la patro en si. Li respondos al vi. En kunligo kun Li, faru el via koro tronon de Lia amo, kaj Li restos en vi.

Ek de nun viaj sukcesoj estos benitaj, kaj mankon vi ne havos. Esperu! KREDU! kaj: "Havu fidon!"

14. Ĉiu renoviĝo okazas per la spirito. Kontrolu viajn pensojn, ĉar malantaŭ ili kaŝas sin via menso: ĝi estas via realaĵo. Kion vi konvinkite pensas, tio realiĝas! La konvinkita penso estas la sama, kiel la montmoviganta kredo. El ĝi fontigiĝas la absoluta volo, la volo de Dio, kiun vi ek de nun obeas.

Jen! Dio estas ĝuste por vi tio, kion vi malkaŝe el via koro de Li atendas; ĉar tio kion vi konvinkite kaj konscie pensas estas la ŝlosilo al la potenco de Dio, kiu estas SPIRITO!

Pensi estas krei! Vi estas kunlaboranto de Dio! Laboru kaj: "Fidu!"

Jasuo Sakurai :

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado

Anglalingva eldono de la sama broŝuro estas havebla por la sama prezo.

La Redakcio

25-paĝa broŝuro
(15 × 21 cm).
Prezo: 2 rkp.
内地 50円

Kies eco estas la batalemo ?

Kiam oni parolas pri la harmonio, reganta en la naturo, tuj troviĝas iuj, kiuj kontestas tiun harmonion asertante, ke ĝi estas nur ŝajno, iluzio por la science ne eruditaj homoj. La unua elokventas pri spirita mondo, la alia ĵuras pri materia leĝaro. Ili ambaŭ estas konvinkitaj pri sia pravo. Estiĝas disiga antagonismo inter ili. Jen—triumfe konstatas iu tria—la karakteriza esenco de la Vivo estas batalemo! Ĝi estas neekstermebla fenomeno. Tial estis kaj estos militoj.

Sed la Vivo estas milionvizaĝa, miliardforma; ĉio havas sian karakterizan econ. Demando: kies eco

estas la batalemo? Ĉu nur la Homo havas tiun ĉi dinamikan econ por certigi sian lokon en la universo kaj en sia malvasta patrujo sur la tero? Ne! En ĉio vivanta ĝi enestas kiel inspira sugesto de la *memamo*: la egoismo. Laŭ ĝi la bestoj instinkte, la homoj konscie, eĉ celscie agas. Ĉe la Homo ekzistas ne nur blinda, sed ankaŭ *racia* egoismo: *memamo*.

La homaro neniam havis pli tragedie krizan periodon dum sia konata historio ol dum la unua duono de la XX-a centjaro. Du mondmilitoj, revolucioj, ideologiaj bataloj riĉe variis kaj la scienco per la teknika evoluigo faris la Teron

Karaj Amikoj de Oomoto!

Bonan novjaron al vi ĉiuj! Via bonega revuo ĉiam alportas al ni Eŭropo ĝojon kaj kuraĝigon. Ni ŝatas ĝian larĝspiritan disradiadon. Ĝi estas ligilo inter ĉiuj homaranoj, kiuj sentas sin proksimaj unuj de la aliaj, ĉar ili same kredas je la unueco super ĉiuj bariloj rasaj, naciaj kaj eklezioj. Ili scias ke la vero ne kuŝas en apartaj kaj disigaj vortoj, sed en bonaj agoj kaj amikaj sentoj.

Multaj el ni havis la plezuron aŭdi aŭ renkonti last-jare nian amikon Eizo Ito kaj lia vojaĝo tra nia kontinento lasas postsignon en multaj koroj. Ree sendu al ni tian bonvoleman vizitanton! Ni pensas al li kaj al vi kun dankemo pro via bona laboro, tiel utila laŭ la idealo de Zamenhof mem, kiu donis sian tutan homan vivon al la klopodo por kompreno, toleremo, spirita unueco kaj harmonio.

Ni benas vian fidelan laboron kaj deziras ke ĝi daŭre portu la fruktojn de viaj homamaj klopodoj. Tutkore Via

Edmond Privat

sendistanca, senlandlima unueca patrujo de la Homo. La aviadiloj, radio senpene neglektas la landlimojn, minimumigis la tempon distancan. Ĉio ĉi estas la rezulto de la *racia memamo* de la Homo, sed Li ankoraŭ staras malproksime for de la agnosko, ke ĉio ĉi okazis vane, se nun, kiam la homa potenco surtere fariĝis preskaŭ senlime suverena, Li lasos vualigi sian klaran vidon per blindaj memamoj rasisma, nacia, kontinenta aŭ ideologia. Hodiaŭ la problemo pri la ekzisto mem estas la—PACO. Hodiaŭ regas la ĥaoso antaŭ kristaliĝo. La Homo bezonas sian *sane racian memamon* por fari el miljara revo *faktan realaĵon* per rekono de egalrajteco por ĉiu popolo, per ĝenerala malarmiĝo, per malfermo de la preskaŭ iluziaj politikaj landlimoj, per reciproka toleremo. Tiu ĉi memamo reale fariĝus la *plej nobla*,

praktika homamo, povanta sole savi la vivon kaj kulturon de la tuta homaro kaj haltigi la frenezan minacadon, eksperimentadon per atom- kaj hidrogenbomboj.

La Homo en la miliardoj de la individuoj, eĉ en la plej izolita terparto, volas ne nur vegetadi, sed *fine vivi* tiel, kiel indas al membro de altintelekta speco, kiu venkis la elementojn, fariĝis scianto de la naturleĝoj per *sia batalemo disigita* en la miliardoj da unuopuloj. Jam estas tempo kunigi la disigitan batalemon por direkti ĝin al unu celo: paca kunestado je intereso de nova, home homa epoko.

Oni rigardu tion, kio kunligas kaj evitu tion, kio disigas! La pli bela estonteco ne bezonas hekatombojn da marĉiroj, venenitan aertavolon, sed fruktoriĉan ĝardenegon de zorge plantitaj, ame vartitaj ideoj, komuna laboro. Tiel estu!



Osaka-Kastelo,
en la urbo Osaka
Foto de A. Ise



Ĉu la homo estas bona ?

En "Oomoto" de Sept-Oktoebro 1960, p. 148/151, aperas tre interesa diskuto de du respektindaj pensuloj, nome S-roj J. W. Leslie kaj Jasuo Sakurai, pri la temo "Ĉu la homo estas laŭnature bona?".

Post plurfoja tralegado de tiuj paĝoj mi petas permeson por diri ion, en espero pliklarigi la temon por kelkaj legantoj, kiujn eble ne konvinkis la diskutintoj.

Antaŭ ol zorgi pri tio, ĉu la "homo" estas "bona", ni penu difini la vortojn "homo" kaj "bono", ĉar ambaŭ nocioj forte ŝanĝiĝas en la tempo kaj en la spaco.

Inter la vivantoj de la planedo Tero la homo estas ĵus veninta estulo, ja tre nova, ĉar dum milionoj da jaroj antaŭ lia apero la planedo estis loĝata de aliaj vivantoj, kelkaj eĉ grandegaj kaj fortegaj, kapablaj engluti tutan homan familion kiel sian matenmanĝon. Laŭ sia korpo li estas besto tute simila al la ceteraj kaj neniel supera laŭ forteco kaj rapideco sur la tero, en la akvo, en la aero ol multaj aliaj. Tiuj antaŭuloj tre ŝanĝiĝis kaj aliformiĝis laŭ la korpoj, ekzemple, lacerto fariĝis arkeopteriko per jarmila evoluado kaj post aliaj jarmiloj arkeopteriko fariĝis primitiva birdo, kiu iom post iom plibeliĝis kaj korpe malgrandiĝis ĝis la belega kolibro, sed tiu progresado estis nur korpa, ĉar la birdo kaj la lacerto restas ĝis nun tre stultaj. La birdoj faras siajn nestojn ĉiam la samajn tra la jarmiloj, ilia arkitekturo neniel progresis. La ĉevalo

de antaŭ jarmiloj ne scias ĝis nun konstrui al si domon.

Ĉe plantoj kaj bestoj manifestiĝas ia Mistera Inteligento tre forta, kiu planas tre saĝe la vivon kaj ĝin plenumas: en semo estas projekto de estonta arbo; en oveto de birdo aŭ insekto estas plano de kompleksa estulo iam aperonta, kaj montriĝas instinkta antaŭvidemo de patrineco, kiu preparas neston kaj nutraĵon por sia idaro, kaj refaras tion saman tra la jarmilionoj sen ia progreso. La Naturo estas do gvidata de Inteligento kaj Forto, kiu estigas la vivon kaj protektas la malgrandulojn. Tiun Misteran Forton ni nomas Dio. Tiu sama Forto Mistera aperigis ankaŭ la homon, laŭ la korpo, besto, sed laŭ la spirito progresema dio.

Kiam li aperis sur la planedo, li devis tuj ekbatali kontraŭ pli fortaj malamikoj, kiuj minacis lian ekzistadon, sed li ilin ĉiujn venkis, detruis iliajn arbarojn, ilin mortigis aŭ sklavigis laŭ sia intereso. Li nur ne venkis la tre malgrandajn malamikojn, kiuj loĝis interne de lia korpo, ĉar ĉi tiujn li ne vidis kaj ne konsciis pri ilia ekzistado, sed nun li jam konscias pri ilia danĝereco kaj iom post iom ilin venkas.

La vivo de la homo estas do senĉesa batalado kontraŭ diversaj malamikoj naturaj kaj ankaŭ kontraŭ aliaj homoj, kaj dank' al tiu senĉesa batalado lia inteligento kreskas, li kreas ŝirmilojn, laborilojn, armilojn, elvolvas sian ekkonon pri la naturaj leĝoj kaj lernas uzi la naturajn leĝojn por sia profito.

Kio do estas "homo", tiu noveveninto sur la Teron?

Li estas inteligenta, ĉiam progresanta Spirito, kiu enkarniĝas kaj aperas sur la Tero en ĉiam pli kaj pli alta grado da konscio, tra senfina serio da enkarniĝoj, kiel klarigas la spiritualismaj skoloj de Bhagvad-Gita, de Budhismo, de Sokrato k. a. Kiu ne scias pri la enkarniĝa doktrino, tiu ne povas kompreni la homon.

Kio nome estas "bono"?

En iu difinita momento kaj en iu difinita loko, bono estas io, kio en aliaj tempo kaj loko fariĝus malbono. Bono por la spirito povas esti malbono por la korpo kaj kontraŭe. Bono por iu povas esti samtempe malbono por aliulo. Bono por venkinta hommanĝanta indiĝeno estas malbono por la manĝota venkito. Sed ambaŭ intelekte progresis per la batalado kaj en ĉi tiu senco la interbatalo estis bono por ambaŭ.

En la nuna stato de la civilizita homaro, la paco kaj la harmonio inter la gentoj, nacioj, klasoj estas rigardata kiel bono, se nur tiu paco alportas al ĉiuj la necesajn rimedojn por komforte vivi, intelekte kaj morale progresi.

Ni jam ekkomprenis la avantaĝojn de interdependeco de ĉiuj unuopuloj kaj de ĉiuj landoj, por universala interhelpado, celanta prosperadon por ĉiuj.

En tiu longa serio da enkarniĝoj la Spiritoj ne estas samaĝaj kaj ne ĉiuj atingis la saman gradon da evoluado, tute kontraŭe: la grandaj amasoj progresis malpli multe kaj devas esti gvidataj, administrataj de tiuj plej malnovaj kaj pli progresintaj, tial eĉ en la *ĉielo*, kiel instruas Oomoto, "ekzistas speco de administracia sistemo, laŭ kiu ĉiuj spiritaĵoj estas regataj en ordo". Sed en la *ĉielo*, t. e. en la spirita mondo, sin trovas pluraj tavoloj da

progreso, kaj ju pli alta estas la tavolo, des pli granda estas la libereco de la unuopulo, ĉar ĉiu iom post iom lernas sin mem saĝe regi, pli klare komprenas la eternajn leĝojn por plenumi konscie siajn devojn, kaj jam ne bezonas tiom, kiom ni, havi super si aŭtoritatulojn, laŭ la deziro de S-ro Leslie kaj multaj aliaj angloj, sed certe ne de ĉiuj sovetanoj. Ili tamen ĉiam obeas al majstroj kaj gvidantoj, pli altaj ol ili.

Kontraŭ la sennaciistoj, kreitaj de Lanti en Esperantujo, kaj la partianoj de ia mondregistaro por malebligi militojn, S-ro Leslie citas la fakton, ke neniam en la Mondhistorio aperis tiom da suverenaj regnoj kiom en nia tempo. Jes, prave; sed ni ne forgesu alian pli gravan historian fakton de nia tempo, nome, ke neniam en la Mondhistorio tiom da homoj perdis sian individuan liberecon de agado kiel nun.

Se laŭŝajne ni ne faras paŝojn por starigi ian mondregistaron, kiel multaj deziras, tamen vastaj teritorioj kun ĉirkaŭ mil milionoj da loĝantoj kreas grupon da interdependaj regnoj, kiuj efektive estas unu sola vastega imperio.

La malnovaj imperioj disfalis en multenombrajn suverenajn (?) naciojn, sed ĉi tiuj aniĝas al bloko da landoj, kunigitaj unuj al aliaj per la sama regsisistemo; ekzemple: la rusa, la turka, la aŭstria-hungara, la germana, la ĉina imperioj de la komenco de nia centjaro disfalis, sed iliaj partoj kuniĝis en la blokon postkurtenan, kiu vere formas komunumon da nacioj, regatan de la sama principaro, t. e. ili formas unu tuton, unu imperion pli vastan, ol ĉiu el la antaŭaj aparte.

Tiu tuto havas pri la bono neniel la koncepton de S-ro Leslie; tute kontraŭe, ĝi opinias, ke la libereco agi laŭplaĉe estas krima, ĉar tiuj pli

inteligentaj trompas la ceterajn kaj alproprigas al si ĉiujn vivrimedojn, kondamnante la amason al mizero kaj malklereco.

Nun ni penu respondi la demandon "Ĉu la homo estas bona?".

La homo estas nek bona nek malbona, li estas ankoraŭ nefinita produktaĵo de la Naturo, iom post iom perfektiganta, por atingi sian propran feliĉon.

Bono ankaŭ ne estas ia konstanta nocio en nia spirito: ĝi nepre ŝanĝiĝas laŭ la progresado de la homo; ĝi estas provizora kaj konvencia ideo. Brita civitano, kiel nia kara S-ro Leslie, havas pri bono ideon neniel similan al la ideo de soveta civitano, kaj hinda filozofo ne akceptas pri bono la difinon de S-ro Leslie nek tiun de sovetano; li havas sian propran koncepton multe pli vastan ol tiuj ambaŭ provizoraj konceptoj.

Tiuj malsamaj konceptoj estas nur spacaj, geografiaj. La tempo ankaŭ ŝanĝas nian nocion pri bono, moralo kaj rajto. La Sanktaj Inkvizitoroj antaŭ

kelkaj jarcentoj havis plenan aprobon de la popoloj kaj registaroj por fari la bonon bruligi vivantaj la herezulojn. Ĉi tio estis morala, rajta kaj bona. Mortigi amase la protestantojn en Francujo, en la jaro 1572, estis bono. Nun ĝi estus malbonego.

La homo vivas en konstanta batalado necesa al lia propra kreskado, sed laŭmezure kiel li pli klare komprenas sian propran intereson, li ĉesas batali kontraŭ aliaj homoj kaj batalas kontraŭ malklereco, malsato, malsanoj, ĉiam favore al ĉiuj homoj. La fina kompreno de la tuthomara solidareco estas ia formo de bono, al kiu ni esperantistoj nun strebas, kaj ni ĝin baldaŭ atingos; tiam ni trovos ĝin tiel banala kiel la ekzisto de vojoj por veturiloj kaj aliaj nuntempaj ĉiutagaĵoj.

Oni ne povas kompreni tiun demandon sen antaŭscio pri la reenkariga doktrino, kaj por ekhavi tiun scion, oni devas ĝin senantaŭjuĝe studi. Ĝi baziĝas ne sur nebulecaj teorioj, sed sur faktoj. Ĝi estas la ŝlosilo, por kompreni la vivon de la homo.

Redakcia anonco

La originalo de "Parto II: Opinio pri la ata-ita problemo" (vd. p.22) estis verkita de T. Mikami por *La aspektoj de esperanto* — provizora titolo de la simpozia libro pri ata-ita, eldonota de STAFETO. Sed interkonsente kun la Eldonisto, s-ro J. Régulo ni publikigas ĝin ankaŭ en nia gazeto per du sinsekvaj numeroj, inkluzive la nunan. Ni dankas al la Eldonisto pro la afabla konsento.

Ni samtempe anoncas, ke la broŝuro "Opinio pri la ata-ita problemo" (t.e. Parto I) jam estas elĉerpita. Tamen, ĝi estos kunpresita en la supra libro de STAFETO; kune kun la samtemaj eseoj de De Hoog, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Pumpr (kaj eventuale unu-du aliaj).

Pri "Dek Principoj de Oomoto"*)

Komentoj de *F. R. Banham*

La 1a, 4a, 5a kaj 10a principoj esence akordas kun la hilelismo de Zamenhof, kiu ankaŭ havas rilaton al Bahaismo (p.14). Tiuj kvar asertas la monoteismon, la unuecon de religia revelacio, la socian rekonstruon agante laŭ la principoj de universala, baze-sintezita kredo. La ceteraj principoj difinas interalie la naturon de la homo, lian ekzistokialon kaj mision, kaj la rilaton de scienco al religio. Zamenhof ne pritraktis tion.

*

Pri la naturo de l' homo la Greka Nova Testamento uzas tri vortojn: *bios*, *phukee* (aŭ, psyche), *pneuma*. Vivo, animo, spirito. A. life, soul, spirit.

BIOS — la vivelemento komuna por ĉiaj sentuloj kaj kreskantaĵoj.

PSYCHE — pli alta vivoformo aŭ -elemento trovebla nur ĉe homoj. La intelekta kaj emocia kapablo, kiu metas nin super la bestojn. Per ĝi ni atingas al mem-konscio, konsciopri nia propra personeco, nia senmorta parto.

PNEUMA — La konscio pri Dio, Di-konscio. Ĉiu homo estas animo senmorta, sed ne ĉiu homo posedas la spiriton, la Di-konscion. Nur li, kiu krias: "Mia animo estas soifanta al Dio", povas ricevi tiun Di-konscion. "Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos" (per la donaco de la

spirito, la konscio kaj kunuleco de Dio). Homo akiras ĝin per konscia akcepto de sia vera rilato al Dio. Laŭ kristana teologio, la "nova naskiĝo" aŭ konvertiĝo el stato natura ("karna") en staton spiritan, "en Kristo", la Eterna Vivo.

La animon de la homo enspiris en lin la Kreanto (Genezo 2/7), sed ni ne estas kompleta verko de la Kreo. Estis lasita al ni margeno, kiun ni devas plenigi, por ke ni kompletigu la faradon de nia potencie glora personeco. Ni ricevu la spiriton per persista strebado al ĝi per Kristo: Lernu pri mi, kaj vi trovos pacon en via animo. Ne tuj ni akiros ĝin, ĉar lernado ne estas spontana procedo, sed finfine ni akiros, se "vi restos en mia vorto". Ĉar per tio "vi scios la veron, kaj la vero vin liberigos".

Jam de la plej frua tempo filozofoj meditis la problemon pri la naturo de l' homo, kaj la spekulativo tiutema estas vasta kaj komplika. La multdiversaj skoloj bazas siajn subtilaĵojn grandparte sur nesamaj interpretoj de ofte malklaraj bibliaj esprimoj; ili sekve estas konfuzaj, kaj postulas persistan paciencon dum serĉado al kontentiga sintezo de l' ideoj.

Tamen, la supran skizeton, malgraŭ ĝia trosimpleco, oni povas provizore akcepti kiel praktikan hipotezon por la ĉiutaga vivo.

*) 25-paĝa libreto (15×21cm), mendebla per 2 rpk. ĉe Oomoto.

Mediunaj Poemoj (2)

Larmo

*Vi scias nome, kio estas larmo?
Ĝi estas, kedu, plej potenca armo,
Trancanta pli ol glavo!
Kliniĝas antaŭ ĝi majestaj reĝoj,
Moliĝas eĉ la plej severaj leĝoj,
Moŝtulo estas sklavo!*

*Vi, el la koro perlo ruliĝanta,
Guteto kun rebrilo diamanta,
Refiguraj' de l' roso!
Silente vi sur vango pala fluas,
Kaj tamen vi, vi tutan mondon skuas,
En ŝton' kaviĝas foso!*

*Vi estas signo ne de malespero,
Sed de l' plej bela sento sur la Tero:
Nobleco de l' animo!
Malgranda, tamen en la sino via
Eĉ speguligas ĉielarko dia,
— Ĉi strio de l' Senlimo!*

Johano Maas

Kanto de Blindulo

*Ve! Blinda! Kial mi ne vidas plu,
Mizera, la majeston de l' Naturo?
Mi certe pekis fiajn pekajn! Nu,
Tre justa estas pun' per nigra muro!*

*Rigardis mi la sunon en vizagon:
Trobrava far' por simpla mortemulo!
Mi ridis Dion, mokis virton, saĝon,
Kaj sanon mi malŝparis sen kalkulo!*

*Okul' atentis sole formojn belajn,
Nur ĉarmaj bildoj interesis ĝin...
Mi amis florojn terajn, ne ĉielajn
De Dia la ĝarden' en la Senfin'!*

*Benata ombro sub la blindvualo!
En ĝi mi vidas klare tutan veron;*

*Mi volus tuj en fajron de l' batalo,
Reiri tuj, eĉ blinda, sur la Teron!*

*Mi estas nun homido malsatinda,
Per mia propra kulpo, ne de Dio;
Sed iam en la karno, eĉ se blinda,
Mi vidos lumon tra l' Evangelio!*

J. Cruz e Souza

Aĝoj

*Maljuna hom', sed korpe, ĉar spirito
Estas ĉiam pli forta por batalo!
Antaŭ ĝiaj okuloj l' Infinito
Disvolviĝas de l' monto ĝis la valo!*

*Ho junuloj, grim pantaj sur la vojo
Flame supren, ne moku nian aĝon!
Ne daŭras ĉiam forto, rido, ĝojo,
Sed vi neniam perdu la kuraĝon!*

*Por junulo la glor' — ilia forto,
Por maljunul' grizeco — la ornamento;
En ĉiu aĝ' minacas nin la morto,
En ĉiu tempo nutras nin la amo.*

*La temp' estas ŝajnaĵo; nur Eterno
Ekzistas, sen komenco kaj sen fino.
Se velkas semo, baldaŭ nova kerno
Entenas novan vivon en la sino.*

*Sed malsama ol kerno en la tero,
La kern' de l' homo — la Spirit' —
ne mortas:*

*Ne spertas ĝi grizecon de vespero,
Sed ĉiam novan lumon ĝi kunportas.*

A. Dombrowski

Rimarkigo: La unuaj du versoj de la tria strofo rememorigas la vortojn de Salomono en "Sentencoj, 20: 29" (en trad. de Z.)

Leĝo

Ĉu vi pensas, ke ĉio sen celo
En la mondo iradus? Eraro!
Sur la mar' sen kompaso kaj stelo?
En mallum' iu vaga homaro?

Ĉu nenie ekzistus do leĝo,
De la sunoj ĝis eta l' atomo,
Ĝenerala por sklavo kaj reĝo,
Tutegale por vermo kaj homo?

Tiu Leĝo al leĝoj supera,
Leĝo, kiun obeas ja ĉio,
Estas Amo, la Forto Mistera,
De l' Kreinto, de l' Patro, de Dio!

Jozefo Wasniewski

Lingvo de Ĉielanoj

Nun volas mi en Esperanto
Min turni al samideanoj.
Ĝi estas la lingvo por kanto,
Parolo de la ĉielanoj.

Nun staras ni ne kvazaŭ ŝtonoj,
Nur fremda ĉe fremda — ho honto!
Plenigas la Spacon la sonoj
De l' himno de la lingvo-ponto!

En kor' Zamenhofon ni laŭdas,
Kaj certe vi ankaŭ sur Ter'.
Ho, kiel interne ni aŭdas
La korojn sen ia mister'!

Ni gloru al Dio de Amo,
Fininta kun tia Babel.
La mond' kunfandiĝas en flamo,
Ligiĝas la Ter' kun Ĉiel'!

Daltro Santos

Larvo

Potenca Cebaot, mi Vin alvokas,
Ke finon metu Vi al fia Ter'!
Senkonsciencaj ĉie Vin provokas,
Bruligas fajron kiel en infer'.

Komprenu: tiel vomis larvo nula
— Kaj nur tielaj estas arogantaj...
Bestidoj en ankoraŭ aĝ' etula
Paradas sub la ter' per tondroj
vantaj...

Ne daŭros longe, ĝis la ĉelo krevos,
Kaj el kokon' ekflugos papilio.
Jen tiam ĝin alia voĉo levos
Tra lumaj steloj ĝis la Tron' de Dio!

Ni estas raŭpoj, sed flugiloj venos,
Kaj tiam Patron en Ĉiel' ni benos!

A. Dombrowski

Sklavigo

Mi vidis filojn for el naskolando,
For de la varmo de patrino sino...
Kalikojn plenajn, tute ĝis la rando,
De senkonsolaj larmoj de patrino...

Mi vidis sunon, super la Saharo,
Vizaĝon kovri pro terur' kaj honto...
Interne tremis eĉ Kilimanĝaro
Ĉe certe nigra homa la estonto...

Zambezo haltis en bolanta ŝaŭmo...
Al fonto reen la diaĵo Nilo...
Leon' ekdormis, velkis for la palmo...
Oazo sabla, seka la daktilo...

Mi vidis homojn, kies korpojn ĝojo
Svingadis gaje ĉe tambura sono,
En ferkatenoj kaj kun ĝem' sur vojo
Al mar', mortantajn aĉe, sen pardono...

Ve! ĉion ĉi mi vidis — kaj bedaŭras,
Sed ne por ĉiam la malbono daŭras,
Ĉar la repagon iam portos fato.
Sinjoroj, sklavoj — ĉiuj ja egalaj;
Fariĝos koroj baldaŭ ne batalaj
Kaj unu estos por alia — frato!

Damba

(Mediumo: Porto Carreiro Neto)

Hiroŝimo neniam ie plu

Jarlonge al ni Japanujo prezentigis per ĉarmaj bildoj, delikatkolore skizitaj bambu-kabanoj, ĉirkaŭataj de figuretoj, florantaj sakurarboj kaj neĝkovrita Fuĝi-jama... Ni admiris la subtilan pentrarton kaj laŭ ĝi unuflanke imagis vivon de tiu malproksima lando. Sed finiĝis dua mondmilito kaj venis tute aliaj bildoj: la fotografaĵoj el Hiroŝimo post atombomba atako. De tiam al niaj imagoj aliĝas ankaŭ la sentumajo de Hiroŝima-teruro. Kaj se forkuranta tempo iom viŝis la kruelecon, memorigas ĝin la bildaro migre ekspozata tra-monde.

Pri la ok bildegoj, ĉiu kunmetita el ok pendantaj rubandoj de japana papero, oni pravas diri, ke ilin pentris la vivo mem. La pentristoj-geedzoj Iri Maruki kaj Toŝiko Akamacu atingis la ruinigitan Hiroŝimon jam kelkajn tagojn post bombeksplodo. Veninte serĉi sian parencaron ili restis por helpi dum savlaboroj. Ne el tio, kion ili en Hiroŝimo sporade skizis, sed el tio, kion ili tie vidis kaj aŭdis, el tio sinsekve estiĝis ĉi bild-verko, ekde 1950 migranta tra la mondo.

Kia terura spektaklo! En tipa nigra-blanka aŭ griza-blanka kolornuancoj (per tuĉo kaj karbokrajono) unuope prezentigas zonoj da teruraĵoj. Figuroj de viroj, virinoj kaj infanoj, plejparte nudaj, neniel volema naturalismo nek simboliko! Tia ĉion aspektigis la atombombeksplodo: homoj estis senigitaj de ĉio sia, eĉ de sia vestaĵo, neatendite, perforte. El vestaĵo, en Japanujo tipe ĉasta, sur viroj kaj virinoj restis nur ĉifonoj, ja plej ofte eĉ ne tiuj, ĉar la

terura aerpremo ŝiregis eĉ haŭton kaj muskolojn de la korpo... Laŭvorte la homo ĝisoste estis tie nudigita... Fantomprocesio, incendio, Akvo, Ĉiel-arko, Geknaboj — tiel nomiĝas la unuopaj partoj reproduktantaj multvarie (kaj tamen timtremige monotone) ĉi tiun pereigon de la homo: denove amasoj da kripligitaj figuroj, tufoj da korpoj kunplektitaj, memorigantaj la kadavro-amasojn en Eŭropo, en naziistaj koncentrejoj. Kaj tiu simileco atestas: kiam kaj kie ajn la homo brutale amase estas murdata, lia senhonorigo aspektas preskaŭ same. Sed sur ĉiu pentraĵo (kaj sub ĝi sur partaj bild-studaĵoj) estas ankaŭ unuopaj homoj; kurbigitaj, karbigintaj, eĉ vermoj sur ĉi korpoj videblas en grandigita detalo. Kaj ĉi tio sendube taskas memori: ĉiu el inter ili estas homo unika, aperiaĵo neripetbla, la homo kun propra vivo al li perforte ŝirrompita!

Estas karakteriza, ke neniu el ĉi scenoj havas japantrajtan fonon, nenio krom etaj teren-aludoj (ekz. bambu-bosketo). Eble eĉ en tio kaŝiĝas la senco: tiuj apokalipse pereantaj homoj ne apartenas al si mem sole, nek al sia Japanujo. Kio okazis, ne estas nur ilia afero, ne estas nur ilia militmalvenko. Kun ili estas ligita la tuta homaro. Hiroŝimo roliĝis en Japanujo — sur la terglobo. Sed la estonta povus okazi kie ajn aliloke!

Plu sekvas la pentraĵoj de "Savado" kaj "Subskriboj - kolektado". Ĉiam ankoraŭ sur la loko de amasmorto kaj tial ĉe neniu el ĉi vivantaj rimarkeblas ĝojo, rido. Kaj tamen ĉi tie ne plu

Aliĝu al la virina kampanjo por paco

Sub la nomo "Voĉo de Virinoj" lastatempe fondiĝis en Toronto, Kanado, virina movado, kiu celas fariĝi tutmonda. Ĝi volas rezisti al la minaco de milito per pozitivaj agoj (i. a. grandskala internacia korespondado) kaj kontribui senpartie al politika malstreĉiĝo inter la grandpotencoj. La movado estas gvidata de tre kapablaj kaj, speciale en internaciaj rilatoj, influriĉaj kanadaj virinoj.

Dank' al mia persona kontakto kun la prezidantino de "Voĉo de Virinoj" (VDV) oni rekomendas en la agadplano la studon de Esperanto por plifaciligi la internacian korespondadon. Pro tio mi jam nun ricevis kelkajn enketojn de virinoj, kiuj volas lerni Esperanton.

VDV instigas ĉiujn individuojn en la kadro de organizoj, al kiuj ili jam apartenas, intensigi tiujn agadojn, kiuj favorigas internacian interkompreniĝon, politikan malstreĉiĝon kaj abomenon al milito. La plej taŭga kampo por tiu-specaj klopodoj estas laŭ mia opinio nia esperanta movado. Esp-istoj jam delonge konsciiĝis, ke nun — pli ol iam ajn antaŭe — paco estas la necesa antaŭkondiĉo ne nur por la progresigo de nia lingvo, sed por la ekzistado de

nia tuta civilizacio, eĉ por la daŭrigo de la vivo sur nia planedo. Tial mi certas, ke la Voĉo de Virinoj estos aŭdata kaj resonigata de la esp-istaro.

Ne nur VDV havos avantaĝojn per la uzo de Esp-o, ankaŭ nia movado ege profitus, se ĉiuj esp-istinoj (kaj eĉ konatulinaj aŭ parencinoj de esp-istoj) skribus al tiu nova organizo. VDV vaste publikigus tiun peresperantan eĥon kaj devus insisti, ke ĝiaj membroj tuj eklernu nian lingvon, por ke ili povu respondi al tiu lavango. Virinoj, kiuj konsciiĝas pri la danĝeroj de nia nuna politika situacio tiel devus kompreni, ke ili bezonas nian internacian lingvon por efike labori por la sekurigo de la paco. La patrina instinkto, gardi la vivon de infanoj, povus — se la lavango venus — puŝi la kanadaninojn el ilia ĝisnuna indiferenteco rilate al la lingva problemo, kaj instigi ilin eklerni Esp-on. Dank' al la bonegaj rilatoj, kiujn VDV havas kun amaskomunikiloj, oni je ĝenerala interesiĝo de la publiko sendube publikigus gazetajn kursojn paralele kun radiaj aŭ televidaj kursoj. Ĝis nun kanadaj virinoj estis ĝenerale neinteresitaj pri mondpolitiko, ili sentis sin sekuraj aŭ senpovaj por entrepreni

vidiĝas en vizaĝoj tiu konvulsia grimaco de mortantoj nek freneziga sopiro pri akvo (Sur la pentraĵo "Akvo" reflektiĝas la streĉita penado pri savo de nefinmurditaj vivantoj—pri la servo al homo, eĉ se pri lasta servo... Kaj sur plua pentraĵo debutas homoj jam kun vizaĝoj vidigantaj decidon batali kontraŭ la atom-morto. Gelaboristoj, kuracisto, virino, knabo, biciklisto, mastrinoj, pastro, .. La maturaĝuloj kun novaj

infanoj, vojrande, sur branĉetoj burĝonas floroj, kaj suprenflugas kolombinoj. Ĉio atestas, ke ĝuste en la aktivado kontraŭ malhumaneco la vivo komencas denove kreski kaj disflori.

Ke Hiroŝimo neniloke plu aperu sur la terglobo—neniam plu! Tion batalstrebos ĉi neĉarmaj, krudekruelaj pentraĵoj el Japanujo—el Hiroŝimo.

El "Kostnické Jiskry" 38/1960 esp-erantigis Jana Cichová /Praha/.

ion. Nun VDV vekis multajn (en la unuaj jam pli ol 700 leteroj alvenis).

Mi ne dubas, ke tiu virina movado rapide ekkreskos ankaŭ en aliaj landoj. Tiucele la edzino de la Nobelpremiito por Paco, s-ino L. B. Pearson promesis en varmkora letero al VDV sian subtenon speciale rilate al havigo de internaciaj kontaktoj kun fame konataj virinoj eksterlandaj. Komprenoble tiuj kontaktoj tre verŝajne okazos per la angla lingvo. Sed por demonstri al la estraro de VDV, ke oni ankaŭ (aŭ eĉ pli efike) per Esp-o povas kontakti tiajn personojn, mi urĝe petas, ke la landaj asocioj tuj komisiu kiel eble plej taŭgajn personojn por kontakti la plej altrangajn kaj konatajn virinojn en iliaj landoj, por ke tiuj altrangulinoj en siaj naciaj lingvoj kun esperanta traduko (aŭ nur en Esp-o) deklaru sian subtenon al la VDV deklaro. (Pli da ekzempleroj de la *Deklaracio* estas haveblaj de la Centra Komitato de VDV).

Se ni povus tiel demonstri al la estraro de VDV la efikon de Esp-o, oni tre verŝajne baldaŭ eldonos ankaŭ esp-lingvajn novaĵleterojn.

La Fakto, ke tiu organizo intencas uzi Esp-on por plifaciligi internacian korespondadon, jam nun informis multajn eminentajn kanadajn personojn pri nia lingvo. Se ankaŭ la estonta internacia organizo uzus Esp-on, tio estus de unuaranga graveco por nia movado, se tio nun sole dependas de la eĥo, kiun mia alvoko trovos. Instigu do tuj ĉiun ajn, ke oni direktu la paperkanonon al Kanado. Oni petu korespondantinojn kaj eldonon de esperanta novaĵletero al VDV, P. O. Box 88, Port Credit, Ontario, Kanado.

Esperante, ke vi subtenos tiujn klopodojn, kiuj tute respondas al la spirito de Esp-o, mi sincere salutas vin.

(S-ino) *Vilma Eichholz*
Vicprezidantino de KEA
Esperanto Press, Oakville,
Ontario, Kanado



Forcejo de Kamejama Botanika Ĝardeno, Kameoka

Unuigo de la du novjaraj festoj

N. Kawasaki

La antikva Japanujo importis lunan kalendaron el Ĉinujo. Ankaŭ ĝiaj post-tempaj revizioj tieaj estis sekvataj en nia lando. Fine, en 1892 Japanujo oficiale alprenis sunan kalendaron. Sed eĉ nun malapero de luna kalendaro ne estas kompleta.

*

Jam pasis kelkaj jaroj, de kiam iniciatintoj de la movado de "Nova Vivo" vigle proponis unuigon de la du novjaraj festoj t.e. per tiu de suna kalendaro. Ni kredis, ke malfacile estas alpreni novan kutimon en vilaĝoj kultivistaj kaj fiŝistaj pro la laboraj cirkonstancoj kaj la firme starigita rutino. Sed 14 vilaĝoj en Tottori-prefekturo kuraĝis observi de nun novjaran feston nur sunkalendare kaj movado simila al ĝi estas rimarkebla en diversaj lokoj lastatempe.

La novjara festo lunkalendara estis, en neĝkovritaj montolokoj kaj ekstremaj regionoj, necesajo el la vivo pli ol simpla kutimo. Tion klarigas la faktoj, ke vilaĝanoj ricevis monon por la rikoltita rizo nur post la novjaro sunkalendara, ke ilia malriĉeco devigis ilin laboregi ĝis la novjaro lunkalendara, kiam profunda neĝo tion malebligis. La tempo, en kiu kultivistoj povas trankvile ripozi korpe kaj anime, estis ja la novjaraj tagoj lunkalendaraj.

Sed nun la afero iom ŝanĝiĝis. Pro la plibonigo de agrokultivaj teknikoj, ekz. enkonduko de maŝinoj, la rikolto-tempo de rizo tiel plifruigiĝis, ke monon por la rizo kvote liverita al la registaro oni povas ricevi jam en novembro. En multaj lokoj la novjaroj estas festataj dufoje t.e. sunkalendare kaj lunkalendare. Sed kontraŭ tio forte leviĝis voĉoj

de mastrinoj, kiuj diras, ke tio estas ne nur duobla elspezo, sed ankaŭ duobla tempo-perdo, kaj societoj de virinaj aferoj stimulis por ĝia plibonigo. Kaj tio multe efikis.

Antaŭ la milito universitataj studentoj venintaj al Tokio el provincoj ne emis reveni hejmen dum la vintra libertempo. Ĉar, se ili revenis, tie oni estis terure okupataj, tial ili estis forlasataj al si mem kaj tute ne povis ĝui la novjaran atmosferon deziratan. Eĉ nun junuloj el vilaĝoj, laborantaj en urboj, havas saman ĉagrenon. Certe tiaj aferoj plirapidigis la unuigan tendencon de la du novjaraj festoj.

Sed en Tōhoku, regiono nordorienta, kaj Kyūsyū, regiono sudokcidenta, multaj lokoj ankoraŭ festas la novjaran lunkalendare kaj vilaĝaj elementolern-ejoj, dividante la vintran libertempon en du, donas al la geknaboj po unu semajno da libertempo en januaro sunkalendara kaj en januaro lunkalendara, tial la lecionoj ne povas esti farataj laŭ la ordo de lernolibroj aŭ la novjara kanto devas esti instruata en februaro t.e. en januaro lunkalendara. Kaj tio estas ĝeno por instruistoj!

Kvankam evitende estas unuecige kaj subite ŝanĝi la tradicion kaj kutimon naskiĝintan el la vivo, necese estas plibonigi ilin en racia direkto, ĉar en tiu tradicio kaj cirkonstanco mem jam okazis ŝanĝiĝoj.

Gratulinda estas ekpenetro vilaĝen de la movado de "Nova Vivo", kontraŭ-anta al rutinoj kaj celanta raciigon kaj modernigon de la vivo. Kaj nia nuna tasko estas nepra unuigo de la du novjaraj festoj.

(Redakta traduko de artikolo en "Osaka Asahi")

La montaroj de Córdoba* (Argentino)

Le montaroj de Córdoba estas unu el la plej bonaj lokoj por turismo, kiujn posedas Argentina Respubliko.

Ili formas la centran konglomeraton sendependa rilate la Andes-ĉenon kaj estas nomataj granda kaj malgranda montaroj.

La kaŭzoj, kial estas altirataj la turistoj al tiu regiono, estas pluraj: la belegaj pejzaĝoj, la boneco de ĝiaj vojoj, la mildeco de ĝia klimato, k. t. p.

La klimato, kiun oni ĝuas en tiuj montaroj, estas treege favora por la sano kaj jamen la epoko de la hispana konkerado oni ekkonis ties ecojn kaj la longedaŭran vivadon de ties loĝantoj.

La historiistoj raportis la kazon pri la maljunulino Lucia Trejo, kiu mortis en Alta Gracia 180 jaraĝa; kaj estas aliaj kazoj, kiuj, kvankam ne atingis tiel eksterordinaran aĝon, tamen ĝuis tre longedaŭran vivadon.

La famon de la montaroj de Córdoba oni jam rimarkis en la XVII-a jarcento kaj en la XVIII-a ĝi jam akiris vastan amplekson.

Nur empiriismo estis la fondinto de la klimatstacioj, kiuj estas tiel multe-



nombraj hodiaŭ. Kaj post tiu empiria epoko alvenis la sciencaj observado kaj sperto rilate la aktinometron¹⁾, la mezologion²⁾, la elektrometron³⁾, la pluvometron⁴⁾, k. t. p.

* Oni devas rimarki, ke en Hispanujo ekzistas ankaŭ samnomaj provinco kaj urbo (Córdoba), kies esperantigita nomo estas Kordovo. Por esperantigo de la argentina provinco kaj urbo ni proponas "Kordobo". Ankaŭ en Meksikio estas urbo nomita Córdoba, kiu kuŝas inter la urboj Puebla kaj Veracruz. La argentina provinco Kordobo, kies areo estas 168.808 kvadrataj kilometroj, troviĝas en la mezo de la lando. — Noto de la aŭtoro.

1) Aktinometrio: Mezurado de la luma intenseco aŭ lumokvanto

2) Mezologio: Studado de la rilatoj inter la medioj kaj la organismoj

3) Elektrometrio: Mezurado de la elektra intenseco aŭ elektrokvanto

4) Pluvometrio: Mezurado de la pluvokvanto

Jen kelkaj klimatstacioj de la malgranda montaro de Córdoba:


Alta Gracia (elparolu: Alta Grasja), kies alteco estas 600 metroj super marnivelo, kuŝas en la departemento Sankta Mario ĉe la unuaj ĉenoj de la malgranda montaro. Ĝi posedas klimaton de rimarkindaj sanigaj karakterizoj, kiujn oni povas profiti dum la kvar jarsezonoj.

Ascochinga (elp.: Askoĉinga) kuŝas sur la orienta deklivo de la malgranda montaro je 700 metroj super marnivelo; ĝi estas ŝirmata kontraŭ la ventegoj kaj havas maksimuman sunlumecon kaj puran senpolvan atmosferon ĉar ĝi estas ĉirkaŭata de riĉega vegetaĵaro.

Cosquin (elp.: Koskin), kiu situas je 715 metroj super marnivelo, estas unu el la lokoj plej vizitataj, ne nur de malsanuloj (pulmaj ftizuloj), sed ankaŭ de sanuloj, kiuj iras tien por ĝui silenton, trankvilon kaj forgesi la urban bruegon.

Sankta Mario de la departemento Punilla (elp.: Punilja), je 654 metroj super marnivelo, estas eble la plej grava klimatstacio de Córdoba ĉar tie kuŝas la granda nacia malsanulejo por tuberkulozuloj. Tiu malsanulejo troviĝas ĝuste ĉe la montarbazo, havas milojn da litoj kaj estas la plej granda de Sudameriko laŭ ĝia kategorio.

Mi povus mencii multajn aliajn lokojn, kien gemalsanuloj kaj gesanuloj sin direktas por ripozi kaj refreŝigi siajn fortojn post intensa laborado. Nenombreblaj estas la pitoreskaj vilaĝoj kaj vilaĝetoj, kiuj modeste sin kaŝas en la montdeklivoj, ĉe kristalakvaj riveretoj, sur ebenaltaĵoj, apud lagoj kaj arbaroj, k. t. p.



La naturo malavare donacis al tiuj montaroj grandajn riĉaĵojn: mineralojn ankoraŭ ne sufiĉe ekspluatitajn; fontojn de kuraciva akvo de rekonata efikeco, kien alkuras amasoj da gemalsanuloj; k. t. p.

Kaj la homo konstruis plurajn digojn, monumentajn konstruaĵojn de hidraŭlika inĝenier-arto; kiuj entenas multajn milionojn da kubaj metroj da akvo por irigacio; vojojn kaj ŝoseojn, kiuj serpentumas tra la montoj; hotelojn kaj sanatoriojn; artefaritajn lagojn kaj parkojn.

Kiam finiĝas printempo kaj komenciĝas somero, la diversaj montarlokoj revigliĝas. La hoteloj, pensionoj kaj privataj loĝejoj pleniĝas je bruemaj homoj, kiuj iras tien por ĝui plenmezure liberecon dum sur la vojoj svarmas aŭtomobiloj kaj aliaj veturiloj ŝargitaj de ekskursantoj avidaj je pejzaĝoj por iliaj pupiloj.

Kaj la montaroj donas ĉion, kion oni petas al ili. Iliaj suproj, valoj, riveroj kaj vegetaĵaro altiras la pentristojn kaj inspiras la poetojn.

Parto II: Opinio pri la **ata-ita** Problemo

Legante HEROLDON pri "La kompleksaj verboformoj"

*Se postesigno gvidas min, mi trovos
La kernon de la vero, se ĝi sidus
Eĉ en la plej profunda kaŝiteco.*

Hamleto, II, ii.

En n-ro 10 (1960) de Heroldo oni skribas: "Estas strange; preskaŭ ĉiuj 'aspektuloj', kiuj iom serioze sin okupis pri la afero, konsentas, ke ilia sistemo estas mankhava (vidu Kalocsay en lia letero al ni, vidu de Hoog en lia artikolo en 'Dia Regno', vidu Teruo Mikami en lia broŝuro, ktp.), tamen ili hezitas tiri el tiu ekkono la sole racian konkludon".

Tial ke mia nomo estas citita, kaj eĉ ne tial, mi eltiros el tiu ekkono mian solan konkludon por montri, kiu el ambaŭ sistemoj estas vere mankhava. Mi tamen ne arogas al mi pretendi, ke mia estas "la sole racia konkludo", ĉar, ĉu iu proponita teorio estus "racia" aŭ ne, tion juĝas la leganto (kaj el la lingva vidpunkto, la nacienco de la esperantistoj estas la plej multobla, diversa kaj kompleksa!); la tasko de proponanto estas nur prezenti ĝin en maniero logika kaj konvinka, sed ne klopodi ĉiel kredigi ĝin "sole racia", raketante kontraŭ la 'oponanta' sistemo per multaj laŭtaj vortoj kiel "absurda", "nelogika", "neracia", "oblikva vidpunkto", ktp. Sekve, en mia traktaĵo mi ne uzos ilin eĉ tie, kie mi volonte uzos ilin. Ili cetere havas nenion komunan kun la esenco de la problemo.

Ankoraŭ kelkajn rimarkojn.

Mia vidpunkto en Parto I estis intence japana-esperantista: mi ĉiam staris fiksita ĉe la limpunkto inter la "antaŭproblema problemo" kaj la "alternativa problemo" (pri kio vd. komencon de p. 4 de mia broŝuro,¹⁾ aŭ de p. 153 de "Oomoto" 1959, kaj Piednoton 2, samloke) kaj klopodis enfokusigi la kernon de la problemo pri ata-ita, farante komparan studon kun la japana pasivo. Kaj el tia starpunkto mi esprimis mian "opinion".

Mia vidpunkto en Parto II estas iom alia: la intenca rezervo de miaj japaneco kaj konsideroj pri la "antaŭproblema problemo" por ia interpaciga solvo sur la "alternativa" nivelo estas tute ekster mia menso. Do, Parto II prezentas mian "opinion" kiel la postan evoluon de mia studo, kaj mia celo estas senrezerve kaj senkondiĉe rekonfirmi kaj "pruvi" la konkludon jam faritan en Parto I: la zamenhofa sistemo devas esti akceptita de ĉiuj por gardi la unuecon kaj tradicion de la lingvo.

El tio sekvas, ke mi devas fari amendon pri unu punkto, kiun mi tuŝis duloke en Parto I. Mi asertis, ke se la tuŝ-punkto de ata-ita estus solvita, tiam la atisma sistemo fariĝus eĉ pli logika ol la zamenhofa. Mi poste agnoskis, konstatis kaj estis konvinkita, ke tiu mia aserto estas sensenca, le, ĉar se ĝi

¹⁾ Represo el "Oomoto", N-ro sept.-okt., 1959

estus "solvita", tiam la problemo jam restus neniam por ĉiuj esperantistoj, kaj 2e, ĉar ĝi estas senmanke kaj simetrie solvita jam de la komenco de Esperanto por uzado de Zamenhof ĝis la lastaj tagoj de lia vivo.

Krom tiu sola amendo, Parto I enhavas nenion, kion mi mem trovis korektenda, por konduki la leganton al tiu ĉi dua Parto.

*

En Parto I mi eksperimente uzis la pasivan partupon "aŭta" kaj formis la ago-rezultajn verboformojn: estas -aŭta, estis -aŭta, estos -aŭta, por respondi al la simplaj aktivaj -as, -is, -os. Kaj por plifaciligi la komprenon pri la evoluo de tempofazoj, mi ekzempligis kiel: je la 1-a horo mi ankoraŭ ne estis naskita, je la 2-a mi estis naskota, je la 3-a mi estis naskata, je la 4-a mi estis naskaŭta, je la 5-a mi estis naskita; aŭ, se la pordo estas malfermita, ĝi estas fermota → fermata → fermaŭta → fermita. Per tio mi celis montri, ke ĉiuj esperantaj pasivaj verboformoj estas stataj tempoj. Nur sole mia "aŭta" estas senaspekta kaj formas kun "esti" ago-rezultajn tempojn. "Aŭta" signas, ke la ago okazas en la priparolata momento, sen ia implico de ago-daŭro aŭ ripetigado: ĝi estas samtempa al *estas, estis, estos*. Ĝi do estas malsama ol la "aoristo"²⁾ (escepte la hazardan koincidon en la preterito).

Zamenhof simple uzas -ita por mia "aŭta". El tio rezultas, kiel ni jam vidis, ke la funkcio de -ita estas duobla: ago-rezulta kaj finita-stata.

Sed oni devas nun agnoski, ke la duobla funkcio de -ita devenas de la same duobla funkcio de la aktiva -is: ago-rezulta kaj stata. Ni vidu tion per ekzemploj el Hamleto³⁾:

Ekz-o 1.

Kaj memoru

Regulojn, kiujn mi al vi instru^{is}: (p. 24)

(= pri kiuj vi *estas* instru^{ita}) Finita stato.

Ekz-o 2.

Ĝuste tian port^{is} li armaĵon. (p. 5)

(= tia armaĵo *estis* port^{ata}) Agodaŭra stato.

Ekz-o 3.

Kaj lepro mian tutan glatan korpon

Tuj kov^{is} per abomeninda ŝelo. (p. 34)

(= *estis* tuj kov^{ita}) Ago-rezulto.

Ekz-o 4.

Kaj jen tre vere en la sama horo,

Pri kiu ili dir^{is}, en la sama,

Perfekte tiu sama maniero

Aperis la fantomo. (p. 18)

(= pri kiu jam *estis* dir^{ite}) Finita stato.

Resume: la verba finaĵo -is havas du funkciojn (ago-rezultan kaj statan) kun kvar tempaj signifoj:

1. Perfekta prezenco (Ekz-o 1)

2. Imperfekta preterito (Ekz-o 2)

²⁾ Vd. Postnoto § 5, Parto I.

³⁾ Ĉiuj ekz-oj, kiujn mi citas el "Hamleto", tradukita de Zamenhof, por montri la tempajn signifojn, havas valoron nur kiel la Esperanta teksto: ili do estas tute sendependaj de la respondantaj verboj en la originala *Hamlet* de Ŝekspiro.

3. Simpla preterito (Ekz-o 3)

4. Perfekta preterito (*Pluskvamperfekto*: Ekz-o 4)

Al tiuj kvar tempaj signifoj de aktiva -is respondas la pasivo per jenaj kvar formoj:

1'. *estas -ita* (perfekta prezenco)

2'. *estis -ata* (imperfekta preterito)

3'. *estis -ita* (simpla preterito: -aŭta)

4'. *estis -ita* (perfekta preterito)

Certe, por distingi la tempajn signifojn inter 3' kaj 4' (la pasivo de Ekz-oj 3 kaj 4) ne ekzistas morfologia diferenco, nek du malsamaj helpverboj (aga kaj stata) estas disponeblaj kiel en certaj nacilingvoj, sed la distingon inter ambaŭ ni povas fari, same kiel en la okazoj de aktiva -is, laŭ la ĉirkaŭteksto,⁴⁾ kiel en,

Kaj tiel mi perfide en la dormo

Per frata mano *estis senigita*

de l' vivo, (p. 34)

(= frata mano senigis min je la vivo: ago-rezulto);

kaj

Levita estis lia viziero. (p. 19)

(= li estis jam levinta ĝin: finita stato).

Nur en okazoj, kiam la senco estas neklara aŭ miskompreniga, ni uzas la sintaksan rimedon por precizigi ĝin per klarigaj adverboj. Tio estas la regulo kiel en la aktivo, tiel en la pasivo. (Ekz-e: oni *jam* kovris ĝin; ĝi estis *jam* kovrita.)

Kiel ni vidas en la pasivo de Ekz-oj 3 kaj 4 — mi ripetas — la funkcio de *-ita* estas duobla (ago-rezulta kaj finita-stata) kaj tio, por plene respondi al la same duobla funkcio de aktiva -is (ago-rezulta kaj finita-stata).

Do, la persista atisma akuzo kontraŭ itismo pri "la absurdeco de la celado esprimi per unu sama participo (-ita) *samtempe* plenumiĝon kaj plenumitecon" (en Heroldo, multloke) estas maljusta kaj maltrafa: oni kondamnas la duoblan funkcion de -ita, kaj tamen, ne kondamnas la same duoblan funkcion de ĝia aktiva -is: oni atakas el la vidpunkto de sia apriora teorio tion, kion itismo efektive *ne celas*; ĉar plenumiĝon la itistoj esprimas jen kiel ago-daŭran *staton* per -ata (2'), jen kiel momentecan *agon* per -ita (3') kaj finitecon antaŭtempan (aŭ posttempan) per -ita (4') kiel finitan *staton*.

Absolute ne temas ĉi tie pri la "absurdeco" de unu sistemo aŭ de l' alia; sed temas, kiel mi montros poste, pri la malsameco de la vidpunktoj de la itistoj kaj atistoj, kies "homa menso" estas egale normala (aŭ nenormala).

⁴⁾ Kiel, en Ekz-o 4 el Hamleto, ni senpene kaj eĉ nekonscie perceptas, ke "diris" (=estis dirite) estas antaŭtempa al "aperis", tiel same ni senpene perceptas la distingon inter la du funkcioj de -ita laŭ la kunteksto. Same, nia normala menso tute ne sentas ĝenon pro la -ita uzata en sinsekva rakontado, kiel en "Post ne plena horo la teo estis trinkita. Janjo estis senvestigita kaj endormigita" (Marta, p. 13), kion ni legas same kiel: "Post ne plena horo oni trinkis teon. Oni senvestigis kaj endormigis Janjon". Nenia konfuzo.

Atismo rekonas en -ita nur la staton de antaŭtempa finiteco (4') kaj absolute malkonfesas ĝian aŭtan funkcion (3'), kaj jam ĝin, tiel dire, eksigis kiel — bastardan ĝemelon. Ĉu la bastardo tamen ne havas sian aŭtentikan 'patron'; ĉu ĝi vere ne estas bezonata en la konjugacia familio de Esperanto? Se ĝia legitimeco estus pruvita el "genetika" vidpunkto, neniu rajtus ĝin arbitre orfigi.

Denove el Hamleto mi citas jenon:

Li eldevigis la permeson mian
Per ne ĉesanta ripetado, tiel,
Ke fine mi al lia peto donis
Sigelon mian. (p. 11-12)

Ĉu oni en tiu ĉi ekz-o ne distingas la du tempajn funkciojn de unu sama finaĵo -is? Evidente, la unua -is estas imperfekta (2 kaj 2') kaj la dua -is signifas momentecan rezulton de ago en simpla pasinteco (3 kaj 3').

Ankoraŭ unu ekz-o kun netransitiva verbo:

Dekdua horo sonis. Iru dormi. (p. 1)

Ĉu tiu ĉi "sonis" ne signifas finitecon en simpla pasinteco? Ĉu ne atismo rekonas ke -is kelkfoje signifas finitecon en pasinteco, kaj praktike uzadas ĝin tiel? Alivorte, atismo uzadas aktivan -is laŭ ĉiuj ĝiaj kvar signifoj kiel itismo, sed al tiuj nekomplete respondas ĉe la pasivo, ĉar en ĝia "simetria" tabelo mankas verba formo por indiki okazmomenton de ago. Certe, ni devas "remi per la remiloj, kiujn ni posedas", sed en la okulo de itismo, unu "remilo" mankas al la atisma "boato"! Konsentite, ke atismo rekonas nur pasintecon en -is sed ne finitecon, kaj ke, -is — normale — estas la "permesita" simpligo de kompleksa *estis -anta*, la supra unua ekz-o fariĝas:

Li *estis* eldeviganta la permeson mian
Per ne ĉesanta ripetado, tiel,
Ke fine mi al lia peto *estis* donanta
Sigelon mian.

Ĉu tia primitiva povas esti la Esperanta verbsistemo⁵⁾? Kio rezultos el tia

5) Kiu alpaŝas la problemon el apriora vidpunkto, ĉiu facile ignoras agnoski la *gramatikan karakteron* de la esperantaj verboj. Ankaŭ W. E. Collinson ne estas la escepto, kiam li skribas en n-ro 17 de Heroldo: "La -as, -is, -os formoj estas aspektoneŭtralaj, ekz. *mi skribas* povas indiki: (1) mi estas en ĉi tiu momento skribanta, (2) mi havas la kutimon skribi, eĉ (3) mi havas la kapablon skribi. Same en la preterito, ekz. *mi skribis*, dum li kantis; *mi skribis* al li ofte; niaj avoj *skribis* pli elegante ol ni".

Tia ekspliko de Collinson eble havus retorikan valoron, sed neniom tuŝas la gramatikan karakteron de la esperantaj verbotempoj. Pri la preterito mi jam klarigis supre. Pri la prezenco mi citos kelkajn ekz-ojn el Hamleto. "Haltu! Kiu iras?" (p. 2) respondus al (1); sed kio do pri "(Iru dormi.) Mi dankas." (p.3); kio do pri "Nu, mi konsentas." (p.3); kio do pri "Nun la ĉielo sendas tian signon." (p. 7), ktp.? La analiza studo pri la gramatika *tempo* de la verboj estas nepre necesa por pritrakti la problemon de ata-ita, eĉ se ĝi estus superflua en ĝenerala gramatiko por la komencantoj.

io-manka sistemo? Antaŭ ol pritrakti ĝin el gramatika vidpunkto, ni spektu la tragikomediton, "Okazas nur ĉe nia Tribunalo", kiu sekvas...

*

Ĉe la kriminala tribunalo. Unu kazo de hommortigo estas prijuĝota. La prokuroro ĉe sia posteno staras kun du notlibretoj en la mano. Unu notlibreto estis prezentita de policano A kaj la alia de policano B. La prokuroro laŭte legas...

PROKURORO: "X estis mortigata je la 10-a a.t.m." laŭ la notlibreto de Policano A, kaj "X estis mortigita je la 10-a a.t.m." laŭ policano B.

Tiam okazas diskuto ĉefe inter advokato kaj la du policanoj, ĉar ambaŭ policanoj estas atismanoj, dum la advokato — malfeliĉe — ĝisosta itismano. La advokato sin turnas al la juĝisto.

ADVOKATO: Sinjoro Juĝisto, ĉar la pritraktota afero havas tian specialan karakteron, ke, de la preciza momento de l' elspiro de la viktimo dependas la sorto de l' akuzito, ni petas sufiĉan tempon por ke ni unue eldiskutu tiun punkton.

JUĜISTO: Mi permesas.

ADVOKATO: Mi dankas. (*Sin turnante al Policano A*) Mi komprenas, ke "estis -ata" respondas al aktiva "estis -anta"; se jes, ĉu vi celas diri, ke oni estis mortiganta X-on je tiu horo?

POLICANO A: Jes, ekzakte kiel vi diris.

ADVOKATO: Ĉu tio signifas, ke la viktimo ankoraŭ spiris je tiu horo?

POLICANO A: Tio estas alia afero, ĉar, kvankam "estis mortigata" esprimas nefinitecon en la momento, pri kiu mi notis, tio *ne* signifas, ke en posta momento la mortigo aŭ mortiĝo *restas* nefinita, same kiel aktiva *-is* ne esprimas finitecon, sed nur pasintecon.

ADVOKATO: Ĉu *-is* ne nepre signifas finitecon kaj ĉu "estis -ata" signifas nur plenumiĝon kaj ne finitecon?

POLICANO A: Jes, ekzakte kiel vi diris.

ADVOKATO: Do, sen ia garantio pri finiteco, ĉu ni povas kompreni, ke X estis ankoraŭ viva je tiu horo?

POLICANO A: Nenia garantio; sed laŭ la plej nova teorio, oni diras, ke "estis -ata" estas plej proksima, efektive, tiel proksima al "iĝis -ita", ke oni normale povas diri: *estis -ata = iĝis -ita*. Laŭ tiu formulo mi faris mian noton en la senco, ke X mortis je tiu horo.

ADVOKATO: Mortis!... sed vi ĵus diris, ke *-is* esprimas nur pasintecon sed ne nepre finitecon? Ĉu li ne estis duonviva?

KOREKTO

En "Kelkaj konsideroj por la sana evoluo de nia lingvo" de T. Mikami, aperinta en la antaŭa numero: sur p. 184, maldekstra kolono, 4-a linio de sube, la esprimo "naciaj neologismoj" devis esti "naciaj idiomoj".

POLICANO A: Vi ne estu tro severa. Kiu *mortis*, tiu *mortis*!

ADVOKATO: Mi vin komprenis. Sed el la vidpunktoj gramatika kaj anatomia mi ankoraŭ ne bone komprenas, kiel homo ankoraŭ-ne-finmortigita povas samtempe esti jam kadavro! Sed tio estas alia afero. Mi nun demandas al Policano B. (*Sin turnante al li*) Mi komprenas, ke "estis -ita" respondas al aktiva "estis -inta"; se jes, ĉu X jam estis mortinta je tiu horo?

POLICANO B: Jes, je tiu horo li *troviĝis mortigita*.

ADVOKATO: Kiam la mortigo do okazis?

POLICANO B: Ĝi okazis senpere antaŭ tiu horo.

ADVOKATO: Senpere? Kio pruvas tion?

POLICANO B: *Je*.

ADVOKATO: Sed se "X troviĝis mortigita je tiu horo", ĉu ne povas esti, ke li troviĝis jam mortigita ne nur "senpere", sed "longe" aŭ "nelonge" antaŭ tiu horo, *je* kiu vi faris vian konstaton?

POLICANO B: Mi estas policano kaj ne gramatikisto. Cetere, oni diras, ke vi ne prenu la aferon tro tragika, ĉar ambaŭ formoj, ata kaj ita, kelkfoje povas esti korektaj. Kaj en la nuna kazo, mi kaj Policano A esprimis unu saman aferon laŭ du manieroj.

ADVOKATO: (*mirigite*) Kiel tio estas ebla?

POLICANO B: Ĉar Policano A emfazis agon per -ata pli ol staton per -ita, kaj mi emfazis staton pli ol agon.

ADVOKATO: Mi nun vidas, ke ĉe via sistemo vi ne disponas konjugacian esprimilon por precize indiki la ekzaktan okazmomenton de homa elspiro, alie ol esprimi ĝin el ĝiaj du proksimumaj ĉirkaŭpunktoj: el la unu punkto de senpere-antaŭtempa mortinteco kaj el la alia de l' aktuala mortanteco. Mi tion ne prenas tragika, sed eĉ tro komika. Tragika estas la kazo, kies horo de elspiro ne estas precize difinebla. Ĉu vi klarigus al mi, kiel en iu sama pasinta momento "dronanto" kaj "droninto" kelkfoje povas esti samsignifaj?

POLICANO B: Tio estas alia afero. Kvankam mi mem ne povas bone klarigi al vi, sed oni baldaŭ eldonos publikan respondon, kaj vi estos forte rebatata.

ADVOKATO: Probable, mi estos rebatata, sed neniam okazos, ke mi *estos rebatita*.

JUĜISTO: (*Man-frapas la tablon*) Sinjoroj, atentu! tiu ĉi kortumo ne estas loko por plua diskutado pri gramatika afero. Jam sufiĉas!

ADVOKATO: (*Al la juĝisto*) Nia diskuto estas finita. Mi konstatis, ke pro manko de ago-rezulta verboformo, la du policanoj uzis du malsamajn esprimojn pri unu afero, kiun la zamenhofanoj facile esprimas per "estis -ita" laŭ la aŭta funkcio — por uzi la esprimon de T. Mikami. Surbaze de tia kompreno, ni estas pretaj eniri la proceduron. Mi dankas.

Kiam oni reprenas la juĝaferon en ordo, la kurteno falas...

*

Nun ni vidu la problemon, ĵus diskutitan ĉe la kriminala tribunalo, el gramatika vidpunkto pli detale.

Se oni *fermas, fermis, fermos* la pordon, tio fariĝas en la pasivo de atismo:

La pordo	{	estas fermata A G O-daŭro
		estis fermata ⁰⁾ A G O-daŭro
		estos fermata A G O-daŭro

Se la pordo *troviĝas, troviĝis, troviĝos* jam *fermita*:

La pordo	{	estas fermita STATO finita
		estis fermita STATO finita
		estos fermita STATO finita

La participo (-ata aŭ -ita) restas ĉiam la sama kaj la tempon de la ago aŭ stato montras la helpverbo: *estas* (nuntempo), *estis* (pasinteco), *estos* (estonteco).

La samo fariĝas jena laŭ itismo:

La pordo	{	estas	{	fermata STATO agodaŭra
				fermita { A G O-rezulto STATO finita
		estis	{	fermata STATO agodaŭra
				fermita { A G O-rezulto STATO finita
		estos	{	fermata STATO agodaŭra
				fermita { A G O-rezulto STATO finita

Kiel ni vidas, la ago-rezultaj tempoj de itismo tute mankas en atismo. Ilin atismo ne bezonas kaj "kutime" esprimas per -ata, kies signifo, laŭ ĝi, estas "plej proksima" al tiuj tempoj. Sekve, laŭforme, atismo ŝajnas pli simpla ol itismo. Sed ke unu ŝajnas pli simpla ol alia, tio ne signifas, ke ĝi estas "pli logika". Oni ne povas diri, ke la sistemo de l' okcidenta ŝako estas "pli logika", ol tiu de la japana, eĉ se la unua ŝajnas malpli komplika ol la dua. Sed pro tiu ĉi ŝakluda komparo oni ne preteratentu la gramatikan fakton, ke kion itismo havas plenekipe, tio parte mankas en atismo, kaj la inverso estas neniam vera.

Se oni "fermis la pordon je la 10-a horo", tio fariĝas en la pasivo,

⁰⁾ Tiu ĉi atisma tabelo rememorigas al mi ian analogion ĉe la malaja lingvo, en kiu oni ne havas konjugacion: la tempojn oni esprimas per adverboj kaj aliaj partikuloj ekvivalentaj al la esperantaj "jam", "ankoraŭ", "baldaŭ" ktp. Ekz-e, oni povas esprimi:

Sahaya pĕrgi sĕkarang. (= Mi iras nun).

Sahaya pĕrgi kĕlmarin. (= Mi iras hieraŭ).

Sahaya pĕrgi besok. (= Mi iras morgaŭ).

Kompreneble, ĉi tio estas tute alia afero, kio tamen donas al mi tian naivan impreson, kian mi ricevas el la atisma tabelo. Kaj ĉi-rilate, ne nur mi, sed ankaŭ argentina samideano E. Sonnenfeld, kiu skribas en n-ro 17 (1959) de Heroldo: "se oni diras: 'la kongreso estis fermata' oni ne diras ion malkorektan, sed oni sin esprimas infanece".

Itismo: La pordo estis *fermita* je la 10-a (=fermaŭta).

Atismo: La pordo estis *fermata* je la 10-a.

Kaj atismo ne povas, nek bezonas, distingi la tempon de la du jenaj frazoj:

a) La pordo *estis fermata* je la 10-a.

b) La infano *estis naskata*⁷⁾ de la 8-a ĝis la 12-a.

Ekzistas nenia diferenco inter ambaŭ verbaj signifoj krom tio, ke en a) la fermo aŭ fermiĝo daŭris momenton *x*, kaj en b) la nasko aŭ naskiĝo daŭris du horojn.

Pri la gramatika karaktero de *-ata* ni jam studis en Parto I. Ambaŭ skoloj interkonsentas, ke ĝi indikas ago-daŭron sed ne finitecon; ke en ĝi ne troviĝas eĉ nuanco da longdaŭro⁸⁾. "Du horoj" aŭ "momento *x*" estas egale ago-daŭro. Sed ni bone memoru, ke "ago-daŭro" eĉ de momento *x* neniam signifas *finitecon*. Pri tio usona atismo A. Lomo tre bone ilustras per ekz-o en n-ro 15 (1959) de Heroldo:

"Iam mi legis en detektivromano, kies titolon mi forgesis, ke 'la policano ĵetis sin kontraŭ la fermata pordo kaj, haltigante la fermadon, eniris en la domon'. Per la uzado de la estanta participo la aŭtoro klare montras ke, kvankam iu jam komencis la fermadon de la pordo, tamen li aŭ ŝi ankoraŭ ne finis ĝin, t. e. ke iu *estis fermanta* la pordon". Tia estas la ago-daŭra funkcio de *-ata*.

Nu, kio estas *-ita* laŭ atismo? Tiu participo esprimas *antaŭtempecon* (finitecon, plenumitecon) rilate al la momento, pri kiu oni parolas. Tial, se mi citas el Hamleto (iom modifante) la frazon:

Aleksandro mortis kaj estis *enterigita*. (p.151),

oni atakus, dirante, ke tia esprimo estas "absurda", "neracia", "nelogika", ktp., ĉar ĝi renversas la tempan ordon. Kial? Ĉar "*enterigita*" signifas antaŭtempan finitecon de la *enterigo* rilate al la momento, pri kiu oni parolas: t. e. "estis" respektive "mortis"; tial Aleksandro, kiu mortis, ne povas esti jam *enterigita* antaŭ la morto. La "sole racia" atisma formo devas esti:

Aleksandro mortis kaj estis *enterigata*.,

ĉar nur *-ata* estas samtempa al la momento, pri kiu oni parolas (*estis*). Jen la atisma teorio, kiu agnoskas en *-ita* nur antaŭtempan finitecon, sed absolute ne la (samtempa) aŭtan funkcion. Tia estas la antaŭtempa funkcio de *-ita* laŭ atismo.

Ĝis ĉi tie, atismo kaj itismo estas en ordo, ĉiu en sia sfero. Sed okazas konflikto pro jenaj formuloj:

Laŭ atismo, *estis -ata* = *iĝis -ita*;

Laŭ itismo, *estis -ita* = *iĝis -ita*.

Jen la kerno de la problemo. (DAŬRIGOTA)

⁷⁾ Alia atismo kataluna, L. Mimó skribas en n-ro 17 (1959) de Heroldo:

"(Momenta ago:) Oni ŝarĝis la valizon sur la aŭton = La valizo estis ŝarĝata (ne: -ita) sur la aŭton.

(Daŭra ago:) Oni ŝarĝadis la ŝipon = La ŝipo estis ŝarĝadata (ne: ŝarĝata)."

⁸⁾ Vd. Piednoto 1 en Parto I.

Parolas la Legantaro

★ S-ro *J. W. Leslie*, Anglujo

Saluton... Mi ĝojas pro la respondo de Jasuo Sakurai (aperinta en la antaŭa n-ro), ĉar ĝi grandparte apogas mian tezon. Mi sincere dankas al li.

Kiam mi menciis la kaŭzojn de la militado (batalado) mi bone konsciis, ke ankaŭ pri aliaj interhomaj konfliktoj la ekonomia faktoro ludas sian malbonan rolon. Mi ne tiom argumentas pri la faktoj de la historio rilate konfliktojn kiom pri la kaŭzo aŭ kaŭzoj.

Mi ne argumentas pri la "spiritaj" vidpunktoj de Oomoto, ĉar mi havas nenian kredon al la supernaturismo. Mi konstatas nur unu "naturon" de la homo: la korpan. Same mia amiko skribas pri la "Ĉielo" sed tion mi ne akceptas kiel fakton. Egale mi ne akceptas la ideon de "revelacio": pri tio mi konsilas, ke oni legu, ekzemple, "The Age of Reason" de Thomas Paine. Do, por mi la ideo, ke "spiritaj regnoj estas regataj en ordo", ke "ekzistas speco de administracia sistemo" simple estas — pardonu mian sinceran opinion — fantaziaĵo.

La citaĵo de Zamenhof bone pri-skribas la situacion sed ne analizas bone la kaŭzon.

Jes, mi "ne forgesas, ke la homo kaj la socio, en kiu li vivas, ankoraŭ ne atingis sian spiritan evoluon sufiĉe, por ke li vivu laŭ sia pura idealismo..." Mi asertas, ke necesas ŝanĝi la fizikajn vivkondiĉojn, en kiuj la homo povas vivi "laŭ sia pura idealismo." Eĉ nun kiam tiuj kiuj organizas militojn bezonas la helpon de la popolamaso: ili utiligas la idealismon de la homoj. Ili neniam simple vokas al ili fariĝi

soldatoj, ĉu? Ne. Ili trompas ilin per idealismaj sloganoj!

La nunaj kondiĉoj kiuj lasas multajn homojn "en malbona medio" estas homkreitaj kaj tute ne necesaj. La posedo de "bona homeco...en ĉiuj cirkonstancoj..." ne solvas la ekonomian problemon de la malriĉegaj popolamasoj de la mondo.

Mi ne povas ne demandi ĉu S-ro Sakurai mem bezonas esti regata de aliaj por certigi, ke li vivu "homece" k. t. p.?

Ne estas mia skolo kiu "tro ignoras la realon de la mondo." Kontraŭe, estas tiuj kiuj konstante predikas pri t. n. "spiritaj" aferoj. Tro ofte ili asertas, ke la homo ne vivas nur per "la pano", forgesante, ke la homo eĉ ne povas ekvivi sen "la pano" en ĉi tiu reala mondo. Pli facile estas balbuti pri la "spirito" ol esplori la realan mondon. Mi estas certa pri la nuna mondo. Mi scias nenion pri kiu ajn estonta mondo — kaj neniu, laŭ mi, fakte scias pri tio.

S-ro Sakurai: dankon pro via tolerema respondo.

★ S-ro *Jos. R. Koch*, Svisujo

Mi volas diri al vi, ke la artikolo "Kredo Preĝo Progreso" de Hidemaru Deguĉi (en Oomoto sept-okto., 1957) kontraŭ la ateismo estis jam kelkfoje tre utila al mi. La aŭtoro diris ĉion en kelkaj mallongaj vortoj kaj en tre bona stilo.

★ S-ro *J. W. Hughmanic*, Usono

Mi legis kun intereso la broŝuron "Dek gvidprincipoj de Oomoto"; ĉar mi estas interesita en la fondo de ĉiuj

religioj. Mia religio estas esprimita per la vortoj de iu saĝulo kiu diras, "Estas nenia religio pli alta ol Vero." Sekve, la tri maksimumoj de Oomoto estas bazo de ĉiuj logikistoj. Nia usona verkisto, Emerson, ankaŭ instruas, ke korpo de la Dio (Universala Substanco) estas la fonto de ĉiuj estaĵoj.

Tio, kion mi deziras esprimi estas: ĉiuj, kiuj havis la vizion de vero, diras la samaĵojn.

Fine, mi deziras diri, ke via gazeto estas interesa kaj ke la enhavaĵoj estas altnivelaj.

★ S-ro Albin Johansson, Svedujo

Jesuo diris: "Metu vian glavon en ĝian ingon, ĉar ĉiuj kiuj prenas glavon, per glavo pereos". Laŭ tia diraĵo mi pensas kaj skribas; la japana militarismo estis, dum la dua mondmilito, treege fervora por fortigi sian militan forton. Simbole la japana militforto estis la plej fortika dum la dua mondmilito. Mi komparas ĝin kun profetaĵo de la profeto Cefanja — laŭ la Malnova Testamento: "Mi decidis kolekti la naciojn, kunvenigi la regnojn, por elverŝi sur ilin Mian koleron, la tutan flamon de Mia indigno." (3: 8.) Tio fariĝis sur Japanujon, unue sur Hiroŝimon, poste sur Nagasakon.

Sed ne koleriĝu pri mi! En Japanujo fondiĝis la movado "Oomoto". (Mi ne scias traduki tiun vorton E-en*), sed mi komprenas ĝin.) Kaj el tiu movado aperis U. H. A.

Dio benu!

Laŭ kristana opinio Oomoto ne estas kristana movado; sed ĝi estas *Kristano*, ĉar mi legis ke viaj originaj gvidantoj admonis al la membroj preĝi al la plej alta Dieco en la ĉielo kaj sur la tero.

La apostolo Paŭlo trovis en Ateno

altaron dediĉitan al nekonata Dio. Do, vi agas kiel atenanoj. Kaj la Eternulo, kiu prizorgas la korojn, bontrovis vian agadon. Tia movado ne troviĝas en Eŭropo.

Germanio estis la plej forte armita dum la dua mondmilito en Eŭropo; kie ĝi estas?

Multaj okcidenteŭropanoj kondamnas la rusan bolŝevisman (komunisman); sed kiuj okazigis tiun bolŝevisman? Estis la okcidenteŭropa militarismo. Ĉia malbono devenas de militarismo.

"Oomoto" kaj U. H. A. estas la plej bonaj pacaj movadoj en la mondo (laŭ mia opinio), kaj tiu movado komenciĝis en Japanujo. Estas beninda ago de la japanoj! Laŭ tiu ago de la japanoj mi trovas ke orienta Azio renkontos pli bonan estontecon ol renkontos okcidenta Eŭropo. Se via U. H. A. movado pli multe disvastiĝus en Eŭropo — ol nun — tio estus bono por Eŭropo.

*

Rilate la spiritisman opinion; kiam mi legis la Biblion, mi trovis ke la Biblio *ne* konsentas kun ĝi. Mi preĝas al la Eternulo en la nomo de Jesuo Kristo.

Rilate la movadon "Oomoto — U. H. A.", mi trovis bonegan decidon uzi kiel komunan lingvon la verkon de d-ro Zamenhof, kiun lingvon mi trovis Granda Donaco de Amanta Ĉiela Patro.

Pri tiu lingvo profestas Cefanja, servanto de la Eternulo en la 3-a ĉapitro kaj 9-a alineo: "Tiam Mi redonos al la popoloj lingvon puran".

Mi trovis ke tiu profetaĵo koncernas Esperanton, tial mi deziras al vi benon kaj feliĉon de tiu, kiu per sia servanto sciigis al homaro, kio iam estos okazonta; kaj d-ro Zamenhof estis tiu servanto de la Eternulo, kiu efektivigis

* Oomoto 大本 laŭvorte signifas: Granda Origino.

tiun profetaĵon, kaj Oomoto-U. H. A. estas tiu organizo, kiu efektivigos (-as) tiun deziron: eldiron de Jesuo, ke ĉiu homo amu sian proksimulon kiel sin mem.

Kaj per nuntempaj vojaĝiloj Japanujo estas proksimulo al mia hejmlando Svedio!

★ S-ro *F. Lee York*, Fla., Usono

En N-ro sept.-okt. de "Oomoto" aperis informo pri la Sesa Mondkongreso kontraŭ Atom- kaj Hidrogenbombo kaj por Totala Malarmado. Tiu organizo denunciis Usonon kun aliaj landoj pro la atombombo kaj militbazoj, k.t.p.

Mi petas, S-ro Redaktoro, notu, ke la atombombo finigis la militon kaj liberigis la popolon el la regado de la ŝintoo-militista klano, kiu iam detruis la Oomoto-Centrojn kaj malorganizigis la Oomoto-Movadon. Nune, Oomoto estas libera, dank' al la atombombo, dank' al Usono, dank' al la Japana-Usona Sekurec-traktato. Nur per helpo de Usono, la popolo de Japanujo estas libera. Nur per helpo de Usono povas la junuloj de Japanujo akiri edukadon. Nur per helpo de Usono povas Japanujo esti finance prospera.

Mi petas: ne permesu al Oomoto esti uzata de la organizo kontraŭ A kaj H bomboj, por kontraŭstari Usonon kaj aliajn liberajn naciojn, kiuj estas la defendistoj de la japana popolo el la sovaĝa regado de ŝintoo-militista aŭ komunista regado de teroro.

Mi petas, S-ro Redaktoro: denunci la deklaron pri Usono kaj niaj kunliganoj. Alie, la liberaj nacioj denuncos vin kaj Oomoton.

Mi konas, ke Oomoto staras por libereco, edukado kaj prospero de la popoloj. Mi petas, ke vi ne permesu, ke aliaj nacioj aŭ popoloj kreu alie.

Usono estas amiko de Japanujo. Ni deziras daŭre resti viaj amikoj. La Esperanto-Movado honoras Oomoton pro ĝia klopodado antaŭenpuŝi la movadon de Esperanto. Mi petas, helpu nin daŭre honori vin. Atombombo kaj hidrogenbombo kaj militbazoj estas necesaj tiel longe, kiel la komunistaj landoj deziras sklavigi la ceteron de la mondo. Per ili Japanujo gajnas ĉiutage. Mi petas, S-ro Redaktoro, denunci la deklaron kontraŭ liberaj landoj. Tre sincere kaj samideane via

★ *Sen Nom Ul*, Kioto

Mi dankas el koro por via favoro sendadi l' organon portantan ja sanon, serenon, kaj benon senliman al kor' de legantoj akorde homamaj, kaj forte kunecaj, senvorte sindonaj, sen laco agantaj por paco homara: kuraco tre kara de l' mondo malsana, mensoga, aroga, sen honto.

Mi sendas donacon forigi grimacon el via vizaĝo, kaj ke kun kuraĝo elspezon vi pagu, senzorge plu agu por tasko-plenumo; tre eta la sumo, sed iĝos ĝi lumo al homkomunumo per inda konsumo de vi, redaktoro, kapabla doktoro afabla al vundo profunda de koro.